

Tradukita literaturo en Esperanto

Miroslav Malovec

Zamenhof konsciis, ke lingvo ne povas resti nur komunika kodo, nur kolekto de vortoj kaj gramatikaj reguloj, sed ke ĝi devas esti ankaŭ literature tralaborita, ke la kulturo faras el simpla komunikilo veran lingvon.

Liaj plej gravaj tradukoj estas **Malnova Testamento** el Biblio, **Fabeloj** de Andersen kaj romano **Marta** de Eliza Orzeszko. Plie li esperantigis plurajn teatraĵojn: **Hamleto** de Ŝekspiro, **Georgo Dandin** de Moliero, **Revizoro** de Gogol, **Ifigenio en Taŭrido** de Goethe kaj **La rabistoj** de Schiller.

Aliaj du poloj, Antoni Grabowski kaj Kazimerz Bein, nomata Kabe, tradukis plurajn verketojn. La ĉefa traduko de Kabe estas **La faraono** de Boleslaw Prus, ĝis nun konsiderata la plej bela esperantlingva libro, kun plej bela stilo. Grabowski esperantigis poezian romanon de Mickiewicz **Sinjoro Tadeo**, en kiu li malkovris multajn principojn de Esperanta poezio kaj tial li estas nomata "patro de Esperanta poezio", kvankam la kritikistoj asertas, ke la traduko ne plu estas tiom viva kaj bela kiel La faraono.

Inter la militoj aperis traduko de la historia romano **Quo vadis** de Sienkiewicz, kiun faris Lidia Zamenhof, filino de Majstro. Ŝi havis tre belan stilon, eble pli belan ol ŝia patro. Alia historia romano de tiu periodo pri la antikva romo estis **Cezaro** de Mirko Jelušič en traduko de Ivo Rotkvič. Ĉi tiu romano de aŭstra aŭtoro ne estas aparte grava verko, sed ĝi estis tradukita en "fajroŝprucan Esperanton" kaj tial fariĝis epokfara. La tradukinto Rotkvič evitis neologismojn, sed kapablis krei milojn da interesaj derivaĵoj kaj metaforoj, kiuj riĉigis la lingvon (*kuleri supon, afiŝi agrablan rideton, fruaĝa junuleto, trenpaŝe promeni*). Li montris, kia riĉaĵo kaŝiĝas en la deriva sistemo de Esperanto. Sed la plej granda tradukisto inter la militoj estis hungaro Kalmán Kalocsay, precipe pro siaj poeziaj tradukoj: **La tragedio de l' homo** de Imre Madách, iom faŭsteca teatraĵo, kaj la **Infero** de Dante. Post la milito li kreis ankoraŭ multajn aliajn tradukoj, el inter kiuj plej gravas **Reĝo Lear** de Ŝekspiro.

Inter la militoj aperis ankaŭ pluraj tradukoj el la ĉeĥa lingvo, sed kutime nur meznivelaj, majstraj estis nur poeziaĵoj aperintaj en gazetoj. Vere fieraj ni povas esti pri **Nokto en Karlův Týn** de Vrchlický esperantigita de Miloš Lukáš kaj ludata dum la Praga kongreso en 1921, pri la **Bukedo** de Erben en traduko de Tomáš Pumpr kaj pri **La blanka malsano** de Karel Čapek en traduko de Theodor Kilián. La kontraŭfaŝisma verko aperis nur kelkajn monatojn antaŭ la germana okupacio.

Post la milito eminentas **Bapto de caro Vladimir** de Karel Havlíček Borovský tradukita de Tomáš Pumpr, **Panjo** de Seifert en traduko de Jiří Kořínek kaj **Sileziaj kantoj** de Bezruč, kiujn ili tradukis komune kun Rudolf Hromada. Al la listo de plej interesaj tradukoj estis ankoraŭ vicigitaj **La milito kontraŭ salamandroj** de Karel Čapek en traduko de nia Josef Vondroušek kaj **Aventuroj de la brava soldato Ŝvejek** esperantigita de Vladimír Váňa.

Inter la postmilitaj tradukantoj elstaras kolumbiano Fernando de Diego, kies traduka ĉefverko estas **La indiĝena hidalgo Don Quijote de la Mancha**. Pasintjare pasis 400 jaroj post la morto de Cervantes, tial hispanaj esperantistoj ciferecigis la tradukon kaj disponigis en la reto. Inter la aliaj tradukoj de tiu tradukisto estas eble la plej grava **Cent jaroj de soleco** de Marquez. Angla poeto William Auld estis ankaŭ grava tradukisto, ekz. **La ĉashundo de Baskerviloj** de Doyle kaj **La Mastro de l' ringoj** de Tolkien.

Pola tradukisto Tomasz Chmielik esperantigis la plej gravan romanon de Boleslaw Prus **La pupo** kaj la plej gravan romanon de germana Nobel-premiito Günter Grass **La lada tambureto**. Rusaj esperantistoj esperantigis rusajn klasikaĵojn: **La malvivaj animoj** de Gogol, **La krimo kaj puno** de Dostojevskij, **Resurekto** de Leo Tolstoj, **Ĉeriza ĝardeno** de Ĉeĥov kaj **La Majstro kaj Margareta** de Bulgakov.

Simile ĉinaj esperantistoj eldonis ĉinajn klasikaĵojn: **Mirrakontoj de Liaozhai**, **Ruĝdoma sonĝo**, **Romano pri la Tri Regno**, **Pilgrimo al la Okcidento**.

El la franca kaj itala literaturoj ni povas fieri pri **Grafo de Monte Kristo** de Alexandre Dumas, **Ĉirkaŭ la mondo en okdek tagoj** de Jules Verne, **La libro de la Mirindaĵoj** de Marco Polo, **La Princo** de Machiavelli, **La malemuloj** de Verga kaj **La gefianĉoj** de Manzoni.

Gravaj estas ankaŭ tradukoj de nederlandano Gerrit Berveling, precipe lia **Antologio Latina**. Kompreneble ekzistas ankoraŭ multaj aliaj tradukoj, sed mi ne volas superŝuti vin tro da informoj. En nia kluba biblioteko estas troveblaj preskaŭ mil tradukoj.

Multaj aliaj estas troveblaj kaj elŝuteblaj en la reto kiel t.n. bitlibroj. Mi klopodis fari ligojn al ili en nia kluba retejo (ekz. dramoj de Henrik Ibsen).

Miroslav Malovec

100 plej legindaj tradukoj <http://esperanto.net/literaturo/tradukita/legindaj.html>

Bitlibroj en Esperanto <http://esperantobrnno.cz/malnova/bitlibroj.html>

25 klasikaj Esperanto-noveloj <http://esperanto.net/literaturo/noveloj/>

Baza legolisto https://eo.wikipedia.org/wiki/Baza_legolisto